CxEA-retkomunikoj 6/2002

1. Pri Václav Špůr en luksa eldonajxo.
2. Kalendaro de Esperanto-arangxoj 2003
3. Retadresaro de esperantistoj
4. Bondeziroj

1. PRI VACLAV ŠPŮR EN LUKSA ELDONAJxO

La eldonejo KAVA-PECH jxus aperigis luksan 174 pagxan publikajxon Doksy a Máchův kraj de la auxtora duopo Renata Mauserová (teksto) kaj Vladimír Richtrmoc (fotografajxoj). Gxi estas interesa por esperantistoj precipe (sed ne nur) pro la cxapitro Personecoj, en kiu apud aliaj konatuloj ligitaj al Doksy (ekzemple Karel Hynek Mácha kaj Miloš Forman) estas dedicxita unu subcxapitro ankaux al Václav Špůr (honora membro de CxEA, 1915-1996), memkomprene kun emfazo de liaj poresperantaj aktivecoj, precipe Someraj kursoj de Esperanto, literatura konkurso Floraj ludoj, bultenon Verda vocxo, ktp.
Espereble baldaux gxi ekaperos sur la librovendejaj bretoj. Gxi estos baldaux kompletigita per konciza enmetajxo en Esperanto kun kiu gxi estos acxetebla (sen altigo de la prezo) cxe la libroservo de CxEA aux rekte cxe la eledonejo.

2. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANGxOJ

En la CxEA-retkomunikoj 1/2003 ni aperigos trarigardon de Esperanto-arangxoj en la jaro 2003, sed nur de tiuj, pri kiuj ni havos precizajn informojn, minimume la adreson (plej bone retadreson) de la respondeca organizanto, dato, loko, pri kio temas. Mi petas cxiujn organizantojn de la arangxoj, kiuj volas esti menciitaj, sendi la bezonatajn informojn plej malfrue gxis la 15-a de januaro al la retadreso chrdle@kava-pech.cz

Estos envicigitaj nur la arangxoj, kiuj okazos sur la teritorio de Cxehxio. Tial ni atentigas la interesatojn pri la partopreno de la E-arangxoj eksterlande (kio ja estas rekomendinda), ke ili konsultu la plej kompletan liston de ili sur la adreso
http://www.eventoj.hu/kalendar

3. RETADRESARO DE ESPERANTISTOJ

Interreto estas pli grava inventajxo por esperantistoj ol por la ceteraj nur nacilingvaj parolantoj, precipe cxar temas pri la popolo logxanda dise en la mondo. Tial plej gravas kono de kontaktebloj inter ili. Unu el la plej meritplenaj servoj estas tiu de Derk Ederveen, kiu jam 10 jarojn okupigxas de kompilado de cxiumonate aktualigata Esperanto-Retadresaro, kiu estas sagxe asekurita kontraux la misuzo de la adresoj. Gxi troveblas cxe
http://home.6wxs.nl/~lide/esperanto-adresaro.txt.zip aux
http://home.qwxs.nl/~lide/esperanto-adresaro.html.zip.

4. BONDEZIROJ

Nome de la tuta Redaktokonsilio de CxEA-retkomunikoj (kies membrojn vi povas vidi en cxijaraj CxEA-retkomunikoj 5) mi deziras al vi, abonantoj de tiu neregula reta periodajxo, gajajn Kristnaskajn kaj jarfinajn festotagojn, bonan starton en la jaron 2003 kaj dum gxi inter aliaj bonaj aferoj sukcesojn en via Esperanta agado.

Cxi tiun lastan alineon (kvankam ankaux gxin mi anticipe sendis prijugxcele al la redaktokonsilio) mi subskribas persone kaj petas komprenon kaj pardonon, ke mi pro vera manko da tempo cxijare (ankorauxaj postsekvoj de la inundego, inter alie) al neniu skribas individuajn, personan bondezirojn.

Estu la 2003 pli bona ol 2002 kaj malpli bona ol 2004!
Petro Chrdle